

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

julio 2007

n-ro 95

**SPECIALA NUMERO PRI SOMERA
GASTADO DE KEL EN HRVATSKO ZAGORJE**



- ★ Esperanto estas 120-jara! (julio 1887 – julio 2007)
- ★ Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Zagorje
- ★ Slavaj elementoj en Esperanta literaturo
- ★ Omaĝe al la granda kroata poeto Dragutin Tadijanović (1905-2007)

Karaj legantoj!

En julio 2007 Esperanto atingis sian 120-an jaron: **1887-2007**. Cent dudek jaroj foruliĝis ekde la julio 1887 kiam en Varsovio estis presita la unua lernolibro de Esperanto. Digna somera datreveno! En diversaj anguloj de la mondo oni diversmaniere festis la kulturhistorian jubileon. Kroataj esperantistoj per financa helpo de Ministerio de kulturo renkontiĝis en Zagorje, inter ties montetoj kaj vitejoj (titolpaĝe) ĉe **Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Hraščina-Trgovišće** de la 20-a ĝis la 22-a de julio kaj kvindeko da ili pozis por la jubilea foto de Milivoj Lozovina (dorsflanke de la revuo). Ni gratulas al ĉiuj niaj legantoj la grandan jubileon de nia lingvo!

Al la renkontiĝo sub la titolo **Slavaj elementoj en Esperanto**, kun la prelegantoj el Pollando, Rusio, Kanado kaj Kroatio estas dediĉitaj niaj venontaj paĝoj.

Departamento Krapinsko-zagorska finance subtenis tiun ĉi numeron de *Tempo* kaj tial ĝi unuavide rilatas al Zagorje kaj la agado de KEL tie. La fotoj de Milivoj Lozovina konservis la someran etoson en Zagorje 2007. La aŭtuna numero de *Tempo*, kiu resumas nian riĉan someron, sekvas post kelkaj semajnoj.


Ni koncizu pri la lastmonataj eventoj.

Kroata Esperanto-Ligo omaĝis la 13-an de aprilo 2007, kadre de **Tago de memoroj pri la viktimoj de holokaŭsto**, per la muzika kaj kultura programo en la zagreba Zamenhof-Strato. En la fokuso estis omaĝoj al la du filinoj de L.L. Zamenhof, **Zsafia** kaj **Lidia Zamenhof** pereintaj en mortkoncentrejo Treblinka en 1942. La Prezidento de Respubliko Kroatio Stjepan Mesić sendis omaĝan florbukedon al Zamenhof-Strato, pri kiu ni aparte dankas (foto de Stipe Muić).



La asembleo de **Kroata Esperanto-Ligo** jarkunvenis la 12-an de majo 2007 en Zagrebo. Tiusemajnfine kroataj fervojistoj-esperantistoj partoprenis sian fakan internacian kongreson en Parizo.

Radenko Milošević kaj **Josip Pleadin** lanĉis, honore al la centa jubileo de Esperanto en Kroatio, gazeton de zagrebaj esperantistoj, titolita **Zagreba Esperantisto**, kies tri belaspektaj kaj informriĉaj numeroj aperis per la helpo de la firmaoj **Pastor** respektive **Megatrade**. Radenko Milošević estas la ĉefa kaj respondeca redaktoro de la revuo, presata en Đurđevac ĉe Josip Pleadin. Radenko Milošević estis elektita por prezidanto de Komitato por la centa jubileo de Esperanto en Kroatio. La komitatoj ekkunsideis kaj ekplanis la zagreban jubileon jaron 2008. La prezidanto publikigis la afiŝon de la kroata Esperanta jubileo, ornamita per la desegnoj de pentristo **Hrvoje Šercar**. La afiŝo ornamas la venontan *Tempo*.



KEJA la 17-an de majo organizis **Familian renkontiĝon** en Slovenio, kiun partoprenis 18 personoj en Andrejev dom sur Sleme en Slovenio.

Esperanto-Societo en Rijeka festas en 2007 la centan jubileon de sia asocio. Okaze de la jubileo aperis riĉinforma turisma libro pri Rijeka en Esperanto. Vi vidos ĝin sur la kovrilpaĝo de *Tempo* tre baldaŭ. Sub egido de la centa jubileo de la 25-a ĝis la 26-a de majo 2007 en **Kostrena** okazis scikonkurso por gelemantoj de elementaj lernejoj pri kono de Esperanto. Kiam antaŭ ses jaroj lernantino **Andela Kanjuo** el Matulji esprimis deziron lerni Esperanton kaj scikonkursi per ĝi, ŝi ne povis iamgi, ke ŝi spronos sian instruiston **Emil Hrvatin** kaj la teamon el Rijeka al plurjara laboro: Kostrena fariĝis la ĉefa edukejo de nia juna generacio, kie gelemantoj renkontiĝas, konatiĝas, lernas kaj maturas. Ni publikigas la artikolon de **Vjekoslav Morankić** pri la rezultoj de Kostrena 2007.

Du denaskaj Esperanto-parolantoj **Tina Tišljar** el Kroatio kaj **Karlijn Van Damme** el Belgio prezentis maje en siaj respektivaj lernejoj abituriantan laboraĵon pri la sama temo **Dulingvismo**. "Mi estas edukita en dulingva medio. Kun alproprigitaj du lingvoj mi apartenas al grupo de dulingvuloj. Interesis min starpunktoj kaj esploroj tiutemaj. Mi volis elprovi iun el teorioj tiutemaj kaj kunkreis enketilon por esplori pri dulingvuloj". *Tempo* aparte prezentos la konkludojn de la abiturianta laboraĵo de Tina Tišljar alinumere.

Dum niaj gelemantoj gastis en Kostrena, la 26-an samsemajnfine en Hraščina-Trgovišće per la financa helpo de departemento Krapinsko-zagorska okazis **meteorita festo** kun verkisto **Igor Mandić**.

La kroata sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj transformiĝis al asocio kun jura personeco kun **Marija Jerković** kiel prezidanto kaj **Emil Hrvatin** kiel sekretario. La fondkunveno okazis la 30-an de junio 2007. La kroata nomo de la asocio estas **Udruga predavaĉa esperanta**.

Esperanto-Societo Liberiga Stelo jarkunvenis la 29-an de junio: la nova prezidanto **Davor Klobučar** gvidas la Societon, vikle esploras pri historio de Esperanto en Osijek kaj eldonis la kroatlingvan broŝuron **Prvi esperantisti u Hrvatskoj, Osijek 1889**. Se ĉiu nia societo havus sian historiiston!... Jam du urbaj instancoj aprobis la proponon de la societo pri Esperanto-Strato en Osijek. Atendata estas la lasta aprobo de la urba instanco.

Vicprezidanto de KEL Davor Klobučar prizorgas la retejon de KEL www.esperanto.hr. Estas interese ke la porjunulara revuo *Teen* en sia junia numero 2007 proponis al siaj legantoj la retejon kiel – la lokon kie junaj homoj povas lerni ion interesan.

La 27-an de junio 2007 mortis en la 102-a jaro la bardo de la kroata poezio Dragutin Tadijanović. Esperanto en 1936 estis la unua fremda lingvo en kiu aperis lia poemaro **Kanto al mia koro**, en traduko kaj propra eldono de **Josip Velebit**. El tiu unua traduko el la fora tempo, ni omaĝe represas poemon *Mia fratino portas lakton en la urbon*.

En junio finiĝis la TV-serio **Ripozu, vi meritas** de la aŭtoroj gefratoj **Snježana** kaj **Goran Trubuson**. "La plej sukcesa enlanda TV-humuraĵo en la lastaj du jaroj" kiel oni titolis ĝin, rilatis al Esperanto: En la dua elsendo de la serio kiel rolulo aperas partoprenanto de medicina kongreso en Zagrebo, kiu estas esperantisto... Estas amuze vidi Esperantan temon sur TV-ekranoj en humura programo.

Renkonte al **Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo** kaj elekto de la nova estraro de Universala Esperanto-Asocio Kroata Esperanto-Ligo protestis ĉe Universala Esperanto-Asocio kaj ties Komitato pri la proponoj de Elekta Komisiono ke **Marija Belošević** estu estrarano de UEA. KEL akcentis ke la kroata asocio deziras ke la nova estraro de UEA konsistu el vere kompetentaj esperantistoj,

kiuj gvidu la Movadon post la 120-a jubileo de la publikigo de la unua lernolibro de Esperanto en Varsovio.

La 22-an de julio muzikistoj **Mikaelo Bronštejn** el Rusio kaj **Hanna Orlewicz** el Pollando, gastoj de KEL, koncertis en Sisak por helpi al refondiĝo de Esperanto-Societo en **Sisak**.

La 23-an de julio 2007 komenciĝis impona filmfestivalo en **Motovun**, istria urbeto sur la monto, kiu en sia reklamado pri la festivalo uzis 50 lingvojn, inkluzive Esperanton. La frapfrazo de la festivalo estis **Bonvenon al la mondo de filmoj**. Oni elsendis la frazon plurfoje per radio kaj presis ĝin ankaŭ sur kelkaj el variaj festivalaj afiŝoj.

Motovun tute proksimas al **Kaŝtelir**, kie nia membro **Marcel Trampuh** kultivas vitojn kaj kies vinspeco **Malvazio de Istrio** en 2006 gajnis 76 el 100 poentoj fare de Instituto por vinkultivado kaj ricevis etiketon *kvalita vino kun geografia deveno*.

Kroata nacia nafta kompanio **INA** akceptis financi du niajn projektojn: al KEL ĝi finance helpas eldoni en Hanojo en Vjetnamio la vjetnaman tradukon de la libro **Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić**. Al Esperanto-Societo Bude Borjan ĝi finance helpis sendi sian junan membron **Kaja Farszky** al Jokohamo por kontribui al programo de Universala Kongreso de Esperanto per marimba koncerto. (Kaja finstudis la unuan jaron en Muzika akademio de Zagrebo.)

D-ro Ivo Borovečki, la honora membro de KEL, gastis julie du foje en TV-programo de Istria TV Nova, prezentante sian riĉan vivon en kiu Esperanto dum jardekoj havas unike gravan rolon.

Zagreba membro de Esperantoligva Verkista Asocio **Zora Heide** sub sia knabina nomo **Zora Vinceljak** gajnis julie la unuan premion por prozo en belartaj konkursoj **Muzo 2007** en **Baltiaj Esperanto-Tagoj** en la litova **Šiauliai**. Tre koran gratulon!

Dudeko da kroataj esperantistoj partoprenis en **Maribor** ĉe Eŭropa Esperanto-Kongreso, kvar ĝuis la samtempan infanan kongreseton sur **Pohorje**. **Vanja Radovanović**, resanigita post aŭtoakcidento, gvidis **Draman grupon** kaj sian teatraĵon en la jubilea **50-a jaro de Studenta Esperanto-Klubo** ĉe la teatra programo en operteatro de Maribor. La gajetosa teatraĵo *Galaksia krosŝipo Ludoviko* en epizodo: *La muro de la mallumo* estu la zagreba viglalingva junulara donaco al la centa jubileo de Esperanto en la mondo.

Al **Japanio**, al **Universala Kongreso de Esperanto** en **Jokohamo** kaj al **ILEI-konferenco** en **Ranzan** forveturis dek du kroataj esperantistoj. Blindaj esperantistoj el Kroatio kongresis en Bulgario.

Pri la riĉeventaj kongresoj raportos la venonta numero de *Tempo*. Ĝi enhavos ankaŭ la nomojn de la membroj kiuj finance helpis al nia ejo en **Vodnikova 9**. De aprilo ĝis aŭgusto 86 membroj enpagis por niaj estontaj ejoj helpon de 1506 eŭroj! Elkoran dankon pro tiu ekzemplodona solidareca ago.

Spomenka Ŝtimec

Kultura agado de KEL en Zagorje: "Renkontiĝoj de meteorito" en Hraščina 2007

ŜTONOJ DE LA ĈIELO EN ZAGORJE ANTAŬ DUCENT JAROJ



Fotis: Zlatko Smerke

D-ro Slavko Rozgaj, profesoro el Varaždin, en **Zagorski kalendar 1957** sur la paĝoj 136-141 jene skribis pri la meteorito el Hraščina:

"Te inter Zlatar kaj Novi Marof, sude de Ivančica, en la bela regiono de Zagorje, troviĝas vilaĝo Hraščina. La regiono estas sufiĉe malriĉa kaj por turistoj neinteresa, sed ĝi havas sian faman historion. La vilaĝo mem estas iom for de la fervojo. Eble tial oni malmulte konas ĝin. Sed ĝuste en tiu regiono okazis la 26-an de majo 1751 tre speciala aperaĵo. Estis merkredo posttagmeze. La homoj laboradis sur la kampo kaj vidis alte en la aero lumon: la granda globo, en amplekso de homa kapo, flugis per forta rapideco al al direkto de la tero. Post ĝi svingiĝis longa, hela vosto, simila al brila serpento. Aŭdiĝis bruo, kiel fajfado kaj, subite, dum la objekto estis ankoraŭ tre alte, la brila globo disfendiĝis en du malpli grandajn pecojn, aŭdeblis eksplodo kaj la vosto baldaŭ malaperis. Ambaŭ brilaj pecoj elŝetadis grandajn fajrerojn. La tuta evento daŭris mallongan tempon kaj ambaŭ pecoj estingiĝis kaj falis surteren".

Intertempe pasis pliaj 50 jaroj. La regiono de Hraščina kaj la vilaĝo Domovec kien alteriĝis la du pecoj de la meteorito, restis simile modestaj kiel en 1751. La pli granda peco de la meteorito estas konservata en Vieno en Naturhistoria Muzeo. La mapligrandan parton konservas Naturscienca muzeo en Zagrebo kune kun la gipsa modelo de la 40-kilogramo vizitinto el la ĉielo. El malpli granda peco, laŭ la legendo, la vilaĝanoj tuj forĝis - najlojn.

La filino de Slavko Rozgaj, Zvezdana Ladika, fariĝis intertempe tre grava kroata teatra pedagogo. La teksto de la patro Slavko Rozgaj pri meteorito daŭre estas aktualas...

Ekde la jaro 1995 Hraščina gastigas programon de Kroata Esperanto-Ligo, kiun finance helpas Departamento de Krapina kaj Zagorje kaj subtenas Komunumo de Hraščina. La kulturaj programoj nomataj *Renkontiĝoj de meteorito* okazas en la bieno de Spomenka Ŝtimec kaj celas proponi al la regiono kulturalan programon per Esperanto. Post sciencistoj kaj fakuloj pri meteorito en la lastaj jaroj gastas kroataj verkistoj... kiuj tiel ricevas eblecon pli bone koni Esperanton. La ĉefaj gastoj la 26-an de majo 2007 estis Igor Mandić kaj Velimir Visković. La lernejo el Hraščina, apartenanta al Elementa lernejo *Vladimir Nazor* Budinščina elmontris siajn desegnaĵojn pri la temo de meteorito.

VERKISTO IGOR MANDIĆ EN ZAGORJE

Velimir Visković enkondukis al la publiko en Zagorje verkiston **Igor Mandić**, unu el la plej fruktodonaj eseistoj de la kroata kulturo. Mandić parolis pri siaj libroj, kun la ĉefa akcento pri sia ĵus eldonita dua eldono de la libro *Adiaŭ, kara Krleža* per kiu li "malmuntis la miton pri Krleža, la granda verkisto kiun la Komunisma partio en Jugoslavio alproprigis kiel sian verkiston dum li estis poeto". **Vera Roknić** legis la fragmentojn el la tekstoj rezultitaj per la renkontiĝoj de Mandić kaj Krleža.

La verkisto prezentis al la publiko sian kontraŭvolan biografion *Sub mian propran haŭton*, kiu per la vendoj de 10.000 ekz. en la lastaj monatoj fariĝis tute specifa kroata plejo inter la libroj. La libro notas la kritikajn pensojn de la cinika verkisto inter du someroj 2003-2004 kaj finas per la subita morto de lia filino Ada. La kroata literaturo ne konas pli skuan dokumenton pri la rilato de la patro kaj filino ol tiu kiun peras la nomita libro al la legantoj.

Dum du horoj la publiko senspire aŭskultis siajn literaturajn gastojn. La ĉeestintoj havis la eblecon ekkoni la multflankan aŭtoron ne nur kiel literaturiston, kritikiston kaj eseiston pri gastronomio, sed unuavide kiel homon. Li mem ŝerce diris ke per tiu sia vizito li sentas kvazaŭ li iĝas membro de Akademio de Zagorje.




Fotis: Milivoj Lozovina



Tomasz Chmielik prezentanta "Meditereanean Brevieron" en Hraščina. (Fotis: Milivoj Lozovina)

Tomasz Chmielik, la plej fekunda eldonisto en Esperanto kaj senlaca tradukisto, kiu riĉigis la Esperantan tradukan literaturon ekzemple per traduko de ĉiuj romanoj de la usona Nobelpremiito Isaac Bashevis Singer kaj per esperantigo de liaj 214 rakontoj, en la lastaj du jaroj tradukis el la kroata literaturo. Lia preferata aŭtoro estas Predrag Matvejević. Prezertinte lastjare "Alian Venecion", ĉi-jare li alportis al Renkontiĝo de verkistoj sian tradukon de "Meditereanea breviero" de Predrag Matvejević. La fama libro pri Mediteraneo kiu ĝis nun estis tradukita en 21 lingvojn (inkluzive la japanan, araban kaj hebrean) kaj ĉe la itala eldonisto aperis la 8-a eldono per 240.000 venditaj ekzempleroj, jen ricevis sian Esperantan veston. La pedantema traduko pri "objektoj, rokoj, faltoj sur la homaj vizaĝoj, la gusto de vino kaj oleo, nuancoj de la koloro de ondoj kvazaŭ dronantaj ĉe Matvejević en la kulturo kaj historio" kiel diris itala verkisto Claudio Magris enkonduke al la itala eldono, kuŝas sub la kovrilo kreita de Željko Gubijan, eldonita per kunlaboro de la polaj eldonejoj *Skonpres* kaj *Libro- Mondo*. Ke pola tradukisto Tomasz Chmielik per giganta traduklaboro faras honoron al la lingvo Esperanto per mirinda verko el la kroata kulturo estas pli ol literatura kuriozaĵo: la unuaj 23 aĉetitaj libroekzempleroj julie en Kroatio estas nur modesta danko al tiu literatura kaj interkultura entrepreno. Vera Roknić legis la belajn kaj pensigajn frazojn el la libro: ĉiuj limoj – kvankam logikaj kaj koncentraj – malaperas kaj ne plu estas firmaj, ili montras idealajn kurbojn kiel izobaroj aŭ ondokrestoj.

Tomasz Chmielik, vicprezidanto de Esperantlingva Verkista Asocio, sub kies egido okazis la Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj, malfermis la aranĝon la 21-an de julio. La ĉeftemo rilatis al *Slavaj elementoj en Esperanta literaturo*. Ni publikigas la unuan parton de la ampleksa eseo *La mirinda slava triopo ... tiun pri Eugen Miĥalski*. Pri la aliaj slavaj aŭtoroj legeblas ĉe la retejo de Verkista Asocio www.everk.it.



SLAVAJ ELEMENTOJ EN ESPERANTA LITERATURO

Eŭgeno Miĥalski el la proleta skolo de la 1920aj kaj 1930aj jaroj

Eŭgeno Miĥalski naskiĝis la 21-an de januaro 1897 en la ukraina urbeto Letiĉev. Siajn infanajn jarojn li pasigis en Mendziboj, kie vivis la fama hasida cadiko kaj kie lia patro trovis laboron ĉe jura prokuristo, kaj poste en apoteko. En ĉi tiu urbeto vivis miksite, sed aparte poloj, rusoj, judoj kaj ukrainoj. Pro sufoka etoso de klaĉoj kaj reciprokaj akuzoj Eŭgeno estis sendita al Voznesensk, kie li lernis en la vira gimnazio. Ĝuste tie, en la biblioteko, li trovis Esperantan lernolibron de Devjatnin, kaj multajn jarojn poste li skribos jene pri sia unua renkontiĝo kun la internacia lingvo: *"La versoj, kiujn mi tra legis en libro: estis la Himno. La ideo de l' Himno min kaptis, la versharmonio min ravis"*.

Kiam eksplodis la unua mondmilito, la juna Miĥalski estis vokita samkiel liaj gimnaziaj kolegoj al militservo, kaj en 1916 li venis al la Ĥarkova milita lernejo. Post la februara revolucio (1917) li transloĝiĝis al Saratov, kie li komencis verkadon kaj tradukadon el la rusa literaturo. Li estis kunfondinto de la revuo *Libera torento* (1918). Sur ĝiaj paĝoj li debutis per siaj poemoj. Samjare oni aperigis la poemaron *La unua ondo* kun versaĵoj de E. Miĥalski kaj V. Poljakov. Rimarkindas la poemo *Torento*, kiu prezentas la pensojn de la juna poeto pri la graveco de Esperanto kaj ĝia literaturo, kaj samtempe fluecon de la poezia frazo kaj lertecon en la elekto de taŭgaj esprimrimedoj, kio malkaŝas la veran majstron.

*Verdaj ondoj trabatas graniton,
ĉion voje forportas kun si,
al Malnovo deklaras militon,
belkantante en mova pasi'.*

Tamen baldaŭ Miĥalski kun fervoro aliĝos al konstruado de la nova socio post 1917. Spurojn de tiu anima ŝanĝo oni trovas en la poemciklo *Fajro*:

*En sang' naskiĝas Amo. El fajr' aperos Vero.
Kaj Belo ekradios el post denseg' fum'.
Post neniig' disfloros denove tuta tero.
Post longa prema nokto ekbrilos fine Lum'.*



Okazis ankaŭ grava ŝanĝo en lia vivo - en 1918 li edziĝis al Olga Bojko en Voznesensk. Post la nupto la juna paro transloĝiĝis al Ĥarkovo, kie du jarojn poste naskiĝis la filino Aleksandra, kiun sekvos la gefratoj Anatolij (1922), Alla (1924) kaj Eŭgeno (1926).

Post 1922 Miĥalski ekloĝis kun siaj familianoj en Odeso kaj komencis viglan agadon en la

proleta Esperanto-movado. En aŭgusto 1926 li ĉeestis du sinsekvajn okazaĵojn en Sankt-Peterburgo la 3-an Tutsovetian Esperanto-Kongreson kaj la 6-an SAT-Kongreson.

Estis la finaj jaroj de ia pliliberigo pro NEP, kio evoluigis industrion kaj terkulturon. Tiu evoluo manifestiĝis ankaŭ en la kultura vivo, precipe en la literaturo kun Izaak Babel, Osip Mandelŝtam, Anna Aĥmatova kaj Boris Pasternak, sed ankaŭ en la filmarto kun Sergej Eĵenŝtejn. Ĝuste en tiu favora klimato povis ankaŭ disvolviĝi la Esperanto-movado.

Tamen la partia gvidantaro bridos ĉiujn simptomojn de libereco. En julio 1925 la Centra Komitato akceptis la rezolucion pri la aŭtoritato de la Kompartio super la literaturo. Aŭtune de 1927 komenciĝis la ekonomia krizo pro la rompo de la NEPa politiko, kaj Stalin eluzos ĝin por la milito kontraŭ internaj kaj eksteraj malamikoj. De aprilo 1929 oni persekutas laŭplane kaj organizite ĉiujn oponantojn de la Stalina reĝimo.

Ĝuste en ĉi tiu jaro aperis la poemaro de Mihalski *Prologo*, kiun en Parizo aperigis SAT, en 2000 ekzempleroj. Ĝi enhavas poemojn, kiuj prezentas la intiman mondon de la aŭtoro, kaj la titolo mem estas signifa por la okazontaj ŝanĝoj, kiuj sekvis post la revolucio. Kiel strange devis aŭdiĝi tiuj poetaj vortoj, kiam en la lando oni murdadis centojn da honestaj civitanoj, kaj en Ukrainio mortadis miloj da kamparanoj pro malsatego, kiun Stalin eluzis kiel politikan batalilon.

*Finiĝis nokto. En ĉirkaŭpreno
ci kisas min, karesas, flustras kun pasio.*

Susuras silko sur kuseno...

Maten' de l' am', de l' tag' mateno -

Unua ora sunradio

penetras ĉambron tra kurteno...

(Fragmento el *Amaj melodioj*)

Responde al la atakoj de siaj kritikantoj, Mihalski aperigos en la eldonejo *Ekrelo* la poemaron *Fajro kuracas* (1932), kiu enhavas la plej politikajn poemojn de la aŭtoro kaj en kiu oni vidas ĉe li personajn transformiĝojn "el individueco al kolektivismo", "el anarĥio al konkorda interdependo" kaj "el senkonscia baraktado" al "celkonforma batalado", kion oni riproĉadis sur la paĝoj de la gazeto *La Nova Epoko*. Tiuj poemoj, skribitaj en la jaroj 1930-1931, samtempe estis provo de saviĝo antaŭ persekutado.

Fine de 1931 Mihalski kun Ludwig Renn fondis IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantaj Verkistoj). Kiam Renn estis arestita (1933) en Germanio kaj fuĝis al Hispanio, por batali tie kontraŭ trupoj de generalo Franco (1936), IAREV estis gvidata de Mihalski kun Kuzmiĉ, Izgur, Usmanov, Nekrasov kaj Bourguignon. Kiel organoj de IAREV aperadis *Nova Etapo* (1931-1933), *Proleta Literaturo* (1934) kaj *Internacia Literaturo* (1935). Eldonado de ĉi tiuj revuoj, kies redaktoro fakte estis Mihalski, kunpuŝiĝis kun obstakloj, kiujn multobligis la komunistaj regantoj. La unua numero de *Proleta Literaturo* (1934) malplaĉis al la Kongreso de Sovetaj Verkistoj. Tio estis averto. Mihalski komencis laboron pri la epopeo *Forĝejo de l' Homoj*, en kiu li "montras, kiel en Sovetio oni edukas per laboro personojn, kiuj estas ĉu krimuloj, ĉu prostituinoj, ĉu politik-malamikoj". Tiel li skribis en *Internacia Literaturo* (1935). Kiel ĉeftemo por lia epopeo devus esti konstruo de la 227-kilometrojn longa kanalo inter la maroj Blanka kaj Balta, kiun duonmiliono da malliberuloj elfosis mane. En la sama revuonumero li anoncis, ke li ekverkis originalan romanon *Nia vojo*, kiu "disvolvos bildojn de la etapoj en la esperanta movado: for de 'neŭtrala' esperantismo al esperantismo revolucia".

Mihalski laboregas, kvazaŭ li antaŭsentus sian

baldaŭan morton. Li tradukis poemojn de la ukraino Ŝevĉenko, de la ruso Puŝkin, kaj de la pola revolucia poeto Broniewski. Li anoncis, ke li komencis laboron super *Esperanta sinonimaro*, kaj manuskripte estis preta la ruslingva verko *Skizoj pri teorio kaj praktiko de esperanta traduko*, aperigota ankaŭ en Esperanto. Li konfirmis, ke li esperantigis la romanojn *Kiel hardiĝis ŝtalo* de Ostrovskij, *Virga kampo* de Ŝolohov kaj *Milito kaj Paco* de Tolstoj, kiun li finis traduki ankoraŭ en 1929.

En 1934, respondante al la postulo de N. Ŝapiro, ke "la enhavo estu senpolitika", li aperigis en Varsovio sian poemaro *Kantoj de Amo kaj Sapiro*. Estas la kolekto de la plej fruaj poemoj de Mihalski, kiujn li verkis en la jaroj 1917-1919.

Por la semantoj de teroro en Sovetio de la 1930aj jaroj ĝuste la agado en IAREV kaj tiu poemaro, kiun li eldonis en la malamata, burĝa Pollando, estis signalo por ekigi persekutadon. La 16-an de marto 1937 oni arestis la poeton, kaj en majo prezentis la akuzon, ke li estas gvidanto de kontraŭrevolucia organizaĵo, kaj en IAREV kasiĝas kontraŭsovetaj trockiistoj. Al la "kulpo" aldoniĝis la poleco de lia patro, soldatservo en la blanka armeo kaj kunlaboro kun eksterlanda (pola!) eldonejo. Por Mihalski komenciĝis la geheno. Horoj de pridemandoj, kaj ankaŭ de kruelaj torturoj. Komence li rezistis, sed kun tempopaso li subiĝis kaj poste li "konfesis" la nomojn de la homoj, kiujn li varbis por sia "trockista subplanka organizaĵo", kio rekte venigis ilin antaŭ la ekzekutan plotonon.

Baldaŭ estis arestita Drezen kaj multaj Kievaj kaj Ĥarkovaj esperantistoj. Ili komencis denunci unu la alian. Kontraŭ Mihalski sian denuncan prezentis Kuzmiĉ el IAREV, ke la gazeto *Proleta literaturo* estis ilo de ĝia fondinto Mihalski kaj lia amiko, franca trockiisto Bourguignon por ke li povu enpenetri en Sovetion. Denuncis lin eĉ lia Esperanta lernanto! Kelkaj el tiuj, kiujn denuncis la turmentata Mihalski, faris la samon kontraŭ li. Tiel fermiĝis la cirko de reciprokaj akuzoj kaj suspektoj. La muelŝtonoj de NKVD senkompatate dispistis la vivon de la homoj, kiuj iam klopodis efektiviĝi la Zamenhofan idearon. La sorto de Mihalski estis sigelita. "Laŭ verdikto de Milita kolegio de l' Supera Juĝistaro de USSR de la 14-an de oktobro 1937 [li] estis verdiktita al V.M.U.N. [ruse: "La plej alta mezuro de krimpuno"] - mortpafo. La verdikto estis plenumita la 15-an de oktobro 1937 en u. Kievo"... (el la arkivo de KGB). Nur en 1958 oni rehonorigis lin per la tribunala verdikto, kaj en 1994 aperis lia *Plena poemaro: 1917 -1937* (FEL, Antverpeno, en la serio "Stafeto" n-ro 18).

(Parto I)

Tomasz Chmielik



Drago Iliŝinoviĉ (dekstre apud Divo Pulitika) kontribuis al Renkontiĝo de verkistoj per teknika helpo por temo "Virinoj en Esperanta literaturo".

Slavaj elementoj en Esperanta literaturo – estis la ĉeftemo de la verkista aranĝo en Zagorje en 2007. Al la slava etoso mirinde kontribuis verkisto kaj kanzonisto Mikaelo Bronŝtejn. Pri la romano de Bronstein *Dek tagoj de kapitano Postnikov*, kiu vivigis la vivon de Esperanto en la unua periodo de ties rusimperia vivo per la figuro de Postnikov, la fondinto de la unua Esperanto-Societo en Sankt-Petersburgo, verkis Domagoj Vidović. Bronŝtejn prezentis sin ne nur kiel aŭtoro, sed kiel recitanto, plurlingva kantisto kaj tradukisto de tiaj rusaj aŭtoroj kiaj estas Aleksandr Puŝkin kaj Iosif Brodskij, kiuj fariĝis integra parto de la Esperanta kulturo al kiu ni ĉiuj apartenas. *Tempo* havas lokon nur por du kantoj el la kanta repertuaro de Mikaelo Bronŝtejn.



Mikaelo Bronŝtejn koncertas en Zagorje



Adieu, Paris!

Varmigas nun decembra sun'
dum tago-vago en kaj kun
ŝatata strata homamas',
senĉapeliga embaras'
antaŭ majeste pompa plac',
antaŭ modele pimpa glac',
antaŭ pontara popuri', -
humilas mi kaj kantas mi:

Adieu, Paris!
Finiĝas morgaŭ la feri',
kunportos for
mi nur vizion vian por
en la patri'
sopiri pri kaj kanti pri...
Adieu, Paris!

Kortuŝa krea halucin'
brakumas min, ensorbis min.
Plu daŭras tag', plu daŭras
vag' -

kaj al Rodin kaj al Balzac.
al la pentristoj en Monmartr',
al vino varma kun amar',
ĉar por inspir' kaj por plezur'
Mi unu tagon havas nur.

Adieu, Paris!
Sen vino venas la ebr'i'...
En la sopir',
kiel rezulto de la ir'
laŭ strata stri',
naskiĝas kri', vastiĝas kri':
- Adieu, Paris!

Fraŭlino ĉarma en metro'
proksimas tro, ridetas tro...
Per la rigard' rapidas ŝi
al la rigard' respondi "Oui!",
sed ĉe la placo de Konkord'
forglutas ŝin ovrita pord'
al plenŝtopita trotuar',
kaj flustras mi: "Au revoir!.."

Adieu, Paris!
Min ree juna sentas mi.
Momenta rev' -
de l' sapveziko hasta krev'.
Sen iluzi'
mi dankas vin pro l' eŭfori'!
Adieu, Paris!

La monda glor', la venta vant',
ŝokegaj por la vizitant',
dorlotas menson, sed por mi
animo via gravas pli.
Banala estas mia ver',
sed eĉ sen gut' de malsincer',
ke en la koro restos nun
cikatro inter sen kaj kun.

Adieu, Paris!
Ho jes, finiĝas la feri',
En van', kun spit'
mi tamen revos pri l' revid',
kaj kun pasi'
ne senespere diras mi:
Adieu, Paris!

Teksto kaj muziko de Mikaelo Bronŝtejn

Kafo*(pola popolkantato)*

*Kafo, kafo, kafo,
Kafo, trinku ĝin.
Sen kafo en sino
La vivo rutina,
Kafo, trinku ĝin.*

*Konjak', konjak', konjak',
Konjak', trinku ĝin.
Se mankas konjako,
Do kafo sen "smako",
Konjak', trinku ĝin.*

*Vino, vino, vino,
Vino, trinku ĝin.
Sen kisoj kaj vino
Ne cedas knabino,
Vino, trinku ĝin.*



*Ejo, ejo, ejo,
Ejo, estu ĝi.
Se mankas loĝejo –
La vivo plebeja,
Ejo, estu ĝi!*

*Ido, ido, ido,
Ido, estu ĝi.
Rapide ĝin faru
Sen helpo najbara,
Ido, estu ĝi.*

*Kanto, kanto, kanto,
Kanto, estu ĝi.
Ja vivo sen kanto –
Eŭnuko-amanto,
Kanto, estu ĝi!*

Esperantigis:
J. Zajdman

VIVPROTOKOLOJ – PREZENTITAJ DE ZDRAVKA METZ

Gastino el Kanado, Zdravka Metz prezentis dum la Renkontiĝo de verkistoj la projekton **Vivprotokoloj**. La libron, kiu kolektis rakontojn pri la vivoj de simplaj esperantistoj eldonis Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo en Berlino 1995. Zdravka Metz kunlaboris kun Ulrich Becker pri la eldono de la libro. U. Becker planas la duan plivestigitan volumon de la verko kaj la publiko estis invitita kunlabori por ĉi. En la libro sub la ĉapitro RAT I MIR, troviĝas la kortuŝa rakonto pri Ratiimir Metz, la patro de Zdravka kaj membro de Esperanto-Societo „Božidar Vanĉik“ el Varaždin. En la fokuso estas la kruelaj spertoj de majo 1945, kiam li, junulo (nask. 1917), laŭ la ordono de partizanoj kiuj ekregis la urbon la 8-an de majo 1945, trairis la suferoplenan krucvojon kiu gvidis lin piede de Zagrebo al Celje en Slovenio. Poste li estis arestita en Turanj, de kie lia frato sukcese liberigis lin. La Vivprotokoloj estas unu el prunteblaj libroj en nia biblioteko.

S. Ŝ.



KEL-PREZIDANTARO AL LA KOMITATO DE UEA

Estimataj komitatanoj,
estimata sinjoro prezidanto,
estimata sinjoro ĝenerala direktoro,

Kroata Esperanto-Ligo, kiel Landa Asocio de UEA, en sia kunsido de la 2-a de julio 2007 esprimis malkontenton kaj akran proteston pri maniero kiel laboris la Elekta Komisiono de UEA, kiu proponis al la estraro de UEA personon el Kroatio, kiu ne membras en Landa Asocio, sed kiu fondis paralelan asocion en Kroatio kaj tiun asocion gvidas. Tiu propono malestimigas la laboron de Landa Asocio Kroata Esperanto-Ligo, kies laboroj kaj rezultoj estas respektataj enlande kaj eksterlande. Nia starpunkto estas, ke ne estas grave ĉu iu el Kroatio estas proponita por la estraro aŭ ne, sed gravas ke por la estraro estu proponitaj la plej kompetentaj esperantistoj el nia internacia komunumo. Laŭ ni, la Elekta Komisiono agis nekompetente, ĉar ĝi proponis nekompetentan personon. Ni, membroj de la Prezidantaro de KEL ne volas enmiksiĝi en la elekton de la estraro, sed ni deziras ke vi, la komitatanoj konu nian starpunkton.

Kun granda estimo, kore vin salutas
por la Prezidantaro
Vjekoslav Morankić
vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo

DEK TAGOJ DE KAPITANO POSTNIKOV DE MIKAELO BRONŜTEJN

Mi provis legi la romanon el vidpunkto de literaturteorio, el vidpunkto de esperantisto kaj el vidpunkto de ordinara leganto.

Boris Kolker skribis ke temas pri "historia romano pri eventoj en Rusia Esperantujo antaŭ cento da jaro". En historiaj romanoj fiktivajn eventojn oni priskribas kiel realajn aŭ aŭtoro elpensas eventojn surbaze de la dokumentoj por ke li faru la plej eble aŭtentikan bildon de la pasinta tempo. Historiaj romanoj ofte estas alegorioj, bona ilo por prezenti momentan situacion sen tiom granda danĝero de interveno de totalisma reĝimo. Bronŝtejn uzis literaturan procedon kiun kroataj literaturaj teoriistoj nomas dokumentareco. Per diversaj dokumentoj Bronŝtejn prezentas al ni ne nur la fruajn epokojn de la rusa Esperanto-movado, sed li ankaŭ prezentas vivadon en la tiama Rusio kaj indikas kelkajn gravajn okazaĵojn je la tutmonda nivelo. Tiamaniere li aldonas eksterliteraturan kuntekston. Tiutempa epoko estis vere turbulema. Preskaŭ ĉiu ago estis karakterizita kiel kontraŭŝtata. Esperantistoj ofte estis preteraj viktimoj de historiaj turbuladoj: "Esperanto estas unu el iloj de framasonismo servantaj por senpersonigo de la popoloj, por poioma paca konkero de tiuj kaj por ties subigo al la influo de la movada centro, kiu troviĝas en la manoj de framasonismaj gvidantoj." Situacio ŝanĝiĝis tro rapide. La plej konkreta estas ekzemplo de Tolstoj. Li estis iumomente estimata rusa verkisto kaj nelonge post tio li fariĝis ŝtata malamiko. Kion tiam en cara Rusia povas atendi juddevena polo kun kosmopolitaj ideoj aŭ organizanto de iu kongreso de stranga societo?

En tiuj turbulemaj tempoj ankaŭ rusa Esperanto-movado ne povis esti unuigita. Bronŝtejn brave skribis pri enmovadaj konfliktoj: personaj (pri tio je la fino), regionaj (precipe pri konfliktoj inter Moskvanoj kaj Petroburganoj) aŭ internaciaj (konflikto inter poloj kaj rusoj, pri kiaj estis konsciaj Zamenhof kaj Postnikov). En la romano ni povas legi pri multaj diversaj individuaj vizioj pri evoluo de la Internacia lingvo. Ni ankaŭ legas pri politikaj celoj de kelkaj individuoj kaj grupoj en la movado. Por esperantistoj la plej interesa parto de la romano estas dialogoj inter kapitano Postnikov kaj Lazaro Ludoviko Zamenhof, gviditaj en la intima atmosfero de ŝipo *Washington*. El tiuj dialogoj ni ekscias multajn faktojn el la vivoj de tiuj du interesaj personoj. Ni denove legas pri kompleksa rilato inter Zamenhof kaj lia patro, pri lia ideo de homaranismo aŭ hilelismo, pri malfacilaj vivkondiĉoj je la komenco de lia kuracista kariero kaŭzita de lia "suspektinda reputacio" kiel judo. Do, ni denove ekkonas la iomete romantikan flankon de la personeco de nia Majstro. Sed, tiu romantikulo estas samtempe decida, kiam li parolas pri idistoj, netuŝebleco de *Fundamento* aŭ pacifismo. Aliflanke, Postnikov devenas de rusa familio kun longdaŭra milita tradicio, sed li estas konscia

ke armeoj ne solvos tutmondajn problemojn. Revoluciaj ideoj kondukis lian fraton en Usonon kaj laŭ informoj de s-ro Ivo Borovečki ŝajnas ke ankaŭ Postnikov finiĝis en Siberio pro "kontraŭŝtata ago" (tion ni ne ekscias en la romano). Al mi estis precipe grava polemiko pri militismo kaj pacifismo kiun Postnikov konkludis: "Kaj mi konkludu, estimata generalo, ke ni povas trankvile labori pri la militista Esperanto-vortaro. Sendube, ĝi estos bezonata." Pensoj de Postnikov pri ebla tolerema kaj prudenta regantaro maltrankviligis eĉ Zamenhof.

Postnikov diris: "Venos regantoj, racie pensataj. Pli ruzaj ol la nuntempaj - ili devas esti ruzaj! Sed ĉu toleremaj? Mi opinias, ke toleremo egalas malforton. Kaj malforta reganto ne longe tenos la region."

Al legantoj neesperantistoj (kaj verŝajne al multaj esperantistoj) la plej interesaj estos salonaj intrigoj, klaĉado, ĵaluzoj, arestoj, juĝprocesoj, spionoj kaj Esperanto kiel iomete mistera afero. Do, tiuj estas elementoj por verki bonan romanon.

El vidpunkto de kroato al mi estas interesa la tiutempa politika kaj socia situacio en Rusio. Afero de belarusa agrikultura magnato Giljeviĉ estas simila al multaj aferoj pri kiuj kroatoj legas ĉiutage en gazetoj. En la nuna Kroatio kaj la tiama cara Rusio vi devas koni administracian lingvon kaj scii kiel regule titoligi ŝtatan

funkciulon (kroate: estimata ministro, malnovruse: via moŝto). Kiam vi finfine akiras la okazon paroli kun ŝtata funkciulo, li ne scias pri kio vi parolas kaj li ofte estas, malgraŭ tio, la nura persono kiu povas solvi vian problemon. Kiam li ne povas aŭ ne deziras solvi vian problemon, li povas tion kvalifiki kiel komploto de superuloj. Bronŝtejn ankaŭ aldonas pensojn pri situacio de eksterlandanoj en Rusio. Estas notinde ke prezentado de sociaj realaĵoj en la kroata literaturo ekondukis aŭtorojn sub influon de rusaj verkistoj (kiel Eugen Kumiĉić kaj Ante Kovaĉić). Ili estas membroj de Kroata justecpartio (HSP) kiu tiam estis liberala kaj iomete anarkiisma partio, kies simpatiantoj estis junaj studentoj kiuj multe legis kaj tradukis rusajn verkojn. (Mi komprenas ke, el nuna perspektivo, tio ŝajnas nekredebla afero). Rusaj verkistoj estis kaj estas legataj de kroataj legantoj.

Laŭ mia opinio Bronŝtejn povus esti interesa al kroataj legantoj. Mi notis nur kelkajn interesajn faktojn kaj vi ekscios pli multe legante la libron.

Kaj, je la fino unu praktika konsilo al vi, karaj, estontaj legantoj de la romano: Ne rifuzu esperantistinojn - ĉar reston de via vivo vi povus pasigi en Siberio. (Sapienta sat!)

Domagoj Vidović





Belec estas malgranda vilaĝo en Hrvatsko Zagorje, la lasta ĉe la monto Ivanščica. En ĝi estas baroka preĝejo de Dipatrina de la Neĝo, konata per escepte kvalitaj freskoj kaj skulptaĵoj. Sur la ĉefa altaro, apud ĉiuj eblaj anĝeloj kaj Diaj sanktuloj, staras ankaŭ la nigra reĝo, unu el la Tri Magoj - Baltazaro.

Dum jarcentoj li estis la sola nigrulo en la vilaĝo (Ĉrnc f Belcu, kiel diradas la vilaĝanoj). Antaŭ kelkaj jardekoj venis la dua nigrulo - el Abisenio. Sajnas al mi ke iu hejmvilaĝa knabino edziniĝis al li. Li enhejmiĝis per aledziĝo. Ili naskis kvar belajn nigrajn infanojn. La kvar nigraj Belecanoj kreskis, kreskis, ili havis nigrajn densajn harplektaĵojn, ili parolis kajkave, futbalis, vizitadis diskejon, kaj la plej aĝa inter ili antaŭnelonge edziĝis al iu knabino el Bjelovar, translokiĝis tien kaj ricevis infanon de bela ĉokolada koloro.

Intertempe Slajba, Slobodan Planinčević, same nigrahaŭta, denaske el Zelina venis profesie por restaŭri la preĝejon. Lia profesia estas restaŭrado. Li amikiĝis kun unu el la niaj nigraj amikoj kaj tiu nun helpas - restaŭri la nigran Magon Baltazaron.

Mi legis tiun ĉi tekston dum la prezento de mia libro antaŭ nelonge. Tuj poste en la salonon eniris Lorenc, unu el niaj malmultaj nigrahaŭtaj Zagrebanoj. Li eniris hazarde, erarvagante, serĉante sian amikinojn. La ĉeestintoj entuziasme ridetis. Estus tro longe klarigadi ĉion-ĉi al Lorenc. Sufiĉus rideti.

Sur la tombejo en Zlatar, okaze de la Tago de Ĉiuj Sanktuloj, N. kaj mi ĉe iu tombo renkontas junan familion. Du etaj malhelharaj bukloharuloj kuretas apude. N. diras: vi fakte verkas verajn rakontojn. Jes, kompreneble. En Belec oni antaŭ nelonge malfermis novan ĉiovendejeton: Afro-Belec.

Zvezdana Jembrih



Gastoj en la preĝeja korto

OMAGĜE AL DRAGUTIN TADIJANOVIĆ (1905-2007)



MIA FRATINO PORTAS LAKTON EN LA URBON

*Mateniĝo. Ŝi leviĝas
Kaj vestiĝas en mallumo de l' glacia ĉambro.
Horloĝo sur la muro tri foje ektusis.
La griza urbo foras, neĝas en ekstero.*

*Singarde ŝi malsupreniras la ŝtuparon
Mantenante ujojn plenajn de la lakto.
Poste patrin' la lastan sur kapon ŝian levinte:
Atentu bone, por ne fali glite.*

*Knaras neĝo, knaras neĝo sub opankoj frostiĝintaj:
Ŝi rapidas por frue alveni,
Por kiom eble plej baldaŭ komenci la vendadon.*

*Unue ŝi proponos lakton angule de la stratoj,
Kaj kiam plene ektiĝos, ŝi eniros la urbokortojn
Kriante: sinjorino, lakton! sinjorino, jen la lakto!*

Tradukis: Josip Velebit



Kardelo kantas

Kio estas kardelo? Kardelo estas birdospeco sur nia foto. Pri kardeloj esperantisto, eksa universitata profesoro, D-ro Milivoj Lozovina, granda fakulo pri birdoj, verkas faklibron. Li loĝas en Zlatar, la plej proksima urbo al la preĝejo en Belec. La libro verkata titoliĝas **Kardeloj en naturo kaj ilia bredado** kaj ne traktos la birdojn nur science sed enhavos plurajn legendojn pri la kardeloj kun multaj fotoj pri kardeloj. La foto venas el la arkivo de lia kolego **Aasef El Rushaidet**.



TRA ZAGORJE: MILENGRAD

Sur la monto Ivanščica troviĝas tuta serio da kastelruinoj, remparoj kaj burgoj kiuj asertas pri la vigla vivo de Zagorje dum la tempo de feŭdismo. El sia impona kolekto Zlatko Smerke disponigis al ni kelkajn fotojn. Jen **Milengrad**, la mezepoka fortikigita kastelo posedata de la familio Herkffy ĝis la mezo de la 16-a jarcento. Tiam, per geedziĝo, ĝi transiris al la familio Patačić. Kial la familio konstruis kastelon en Zajezda, ĝi forlasis Milengrad. Ekde tiam la kastelo ekruiniĝis. Milengrad estas nuntempe la nomo de grimpisto asocio el Budinŝovina.

Zlatko Smerke

KROATA KONKURSO PRI SCIO DE ESPERANTO POR LERNANTOJ EL ELEMENTAJ KAJ MEZAJ LERNEJOJ

De la 25-a ĝis la 27-a de majo ĉi-jare en Kostrena, urbeto ĉemara apud Rijeka, okazis **Kroata konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj kaj mezaj lernejoj**. La konkurso por lernantoj el elementaj lernejoj okazis jam la sesan jaron, kaj por mezlernejoj la duan jaron laŭvice.

En la konkurso, konata ankaŭ sub la nomo **Pokalo Kostrena** ĉeestis 21 gelernantoj el ses elementaj kaj 3 mezaj lernejoj el Zagrebo, Dubrave Vrbovečke, Sesvete, Sveti Križ-Začretje kaj Rijeka.

Ĉi-jare la konkurso okazis kadre de celebrado de 100-jara jubileo de fondiĝo de la unua esperantista organizo en Rijeka kaj Kroatio.

Jen la venkintoj:

Elementaj lernejoj

Kategorio A (por komencantoj)

1. Nikolina Gegić, lernantino el Elementa lernejo (EL) "Retkovec", Zagrebo
2. Veronika Brnabić, lernantino el EL "Zrinski", Zagrebo
3. Dominik Radelić, lernanto el EL "Dragutin Tadijanović", Zagrebo

Kategorio B (supera)

1. Dora Hoelbling, lernantino el EL "Mladost", Zagrebo
2. Monika Dabo, lernantino el EL "Mladost" Zagrebo
3. Ne aljuĝita.

Mezaj lernejoj

1. La unuan lokon dividas du gelernantoj:
 - a. Andela Kanjuo, lernantino el Kemi-grafika lernejo Rijeka
 - b. Drago Ilišinović, lernanto, el Mezlernejo Sesvete
3. Dobriša Avramović, Konstruista lernejo por industrio kaj metioj, Rijeka

Per "Pokalo Kostrena 2007" estas premiita

Elementa lernejo «Mladost» Zagreb kiel la plej bona lernejo



La plej sukcesaj lernantoj (unuaj tr) estis premiitaj per diplomoj kaj pokaloj. Ĉiuj lernantoj ricevis donace libron en Esperanto **Triopo Terura** (origine: *Trio zvan grozota*) de kroata verkistino Antoaneta Klobučar en traduko de Davor Klobučar.

Premiitaj per medaloj estis la plej juna lernantino Valerija Neduhal el Elementa lernejo el Dubrave Vrbovečke kaj la plej bona lernantino Dora Hoelbling.

Samtempe okazis ankaŭ la renkontiĝo de junularo kun la temo **Komunikado en Esperanto**.

Por la sukcesa realigo de la konkurso kaj renkontiĝoj oni devas danki al gvidantoj de la projekto Emil Hrvatin kaj Boris di Costanzo, al geinstruistoj kaj gvidantoj de gelernantoj Marija Jerković, Judita Rey Hudeček, Tihomir Lovrić, Dag Treer (ĉiuj el Zagrebo), membroj de la ekzamena komisiono Josipa Katunar, Ana Radulović kaj Gordana Katunar el Rijeka kaj al ĉiuj aliaj kiuj per sia sindona laboro multon helpis.

Okazis ankaŭ ekskurso al Opatija. La celo de la ekskurso estis konatigi al ĉeestantoj la kulture heredaĵon de nia lando.

Deko da geinstruistoj partoprenis en la konkurso kiel mentoroj de gelernantoj. Ili ankaŭ fakkunsidis.

Ĉiutage estis organizitaj amuzvesperoj sub lerta gvidado de membroj de KEJA (Kroatia Esperanto-Junulara Asocio) kaj ties prezidanto Dag Treer.

Vjekoslav Morankić

Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXVI, numero 95 (2/2007), ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Županija Krapinsko-zagorska.

Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio, **tel:** (385 1) 4617550, **fakso** (385 1) 4619373, **rete:** esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr - **Kontribuis:** Ivo Borovečki, Mikaelo Bronštejn, Tomasz Chmielik, Boris Di Costanzo, Zvezdana Jembrih, Davor Klobučar, Tihomir Lovrić, Milivoj Lozovina, Radenko Milošević, Vjekoslav Morankić, Stjepan Muić, Josip Pleadin, Vanja Radovanović, Judita Rey Hudeček, Aasef El Rushaidat, Slavko Rozgaj, Zlatko Smerke, Spomenka Štimec, Dragutin Tadijanović, Tina Tišljar, Josip Velebit, Domagoj Vidović, Jefim Zajdman. **Redaktis:** Spomenka Štimec, **Grafike aranĝis:** Josip Pleadin. **Presis:** Grafokom, Đurdevac, grafokom@kc.htnet.hr

Anonctarifo 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR) 1/2 paĝo 500 kn (68 EUR), lasta kovrilpaĝo 2.500 kn (328 EUR). **Abono:** 4 numeroj jare 40 kn (9,5 EUR), unuopa numero 10 kn (1,5 EUR)

La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.



Fotis: Milivoj Lozovina

Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj 2007